



INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

2007-03

Julio 2007

ISSN-1612-7927


ina-asocio@web.de

www.esp-ina.com

€ 3,50

Iksodoj minacas per malsanoj

De Harald SCHICKE, Germanio



La foto montras la grandecon de iksodo en komparo kun la kapeto de alumeto. La foton faris André Karwath (aka). Ĝi aperis en Vikipedio.



*Iksodo atendente sur folio.
Foto: Vikipedio*

Iksodo (Ixodes) estas genro de traĥeuloj el la ordo de akaruloj, kiu vivas sur herboj kaj arboj. Tie ili atendas iliajn nutrantojn. Por evolui kaj nutri siajn ovoj, la iksodoj bezonas la sangon de birdoj aŭ mamuloj, sur kiuj ili vivas parazite.

Pro tio ilia korpo estas eksterordinare ŝvelebla. Finsuĉinte ili lasas sin fali. En tiu stato ili havas ventron kun diametro de proksimume unu ĝis tri (iksodinoj) centimetroj.

Por sukcese suĉi, ili injektas diversajn substancojn. Ĉar iliaj suĉiloj estas multe pli dikaj ol tiuj de kuloj, ili unue anestezas la haŭton. Poste ili per alia substanco zorgas, ke la sango ne koaliĝu. Per speciala gluaĵo ili fiksas siajn suĉilojn, kiuj tenas la tutan korpon dum kelkaj horoj (viraj iksodoj) aŭ dum kelkaj tagoj (iksodinoj). Fine ili uzas kont r a ŭ i n f l a m a n substancon por ke la nutranto laŭeble ne rimarku la paraziton.



La suĉiloj de iksodo. Foto: Richard Bartz en Vikipedio.

Mondvaste ekzistas proksimume 650



Iksodo suĉanta sangon sur vira kruro. Foto: Simon Eugster en Vikipedio.



Iksodo suĉinte sangon (videbla estas la ventro). Foto: Jost Jahn en Vikipedio.

specoj de iksodoj. Post relative varma vintro kaj dum pluvema somero, ili aperas grandkvante. La problemo estas, ke ili povas transigi diversajn malsanojn.

La plej konataj estas

- Borelioza, kaŭzitaj de borelioj (bakterioj)
- Rikeciozoj, kaŭzitaj de rikecioj (bakterioj)
- Frusomera meningoencefalito (FSME), kaŭzita de virusoj

Borelioza

Tiun malsanon oni ankaŭ nomas malsanon de Lyme. Ĝin kaŭzas la bakterio *Burgdorferi*, kiu estas parenco de la bakterio, kiu kaŭzas sifilison. Ĝi povas infekti ĉiujn organojn kaj nervojn de la korpo tiel ke la simptomoj estas tre diversaj.

La plej karakteriza simptomo estas la migranta ruĝeco. Oftaj estas febro, artikaj doloroj, alilokaj doloroj subitaj kaj akraj, konvulsioj.



La ruĝa makulo migras. Foto: Jost Jahn en vikipedio.

La klasika medicino - kiel kutime - preskribas antibiotikojn, sed ili helpas nur se oni uzas ilin tuj en la komenco. Tio plej ofte ne eblas, ĉar oni ne ofte rimarkas la

suĉadon en la komenco.

La naturo ofertas tre taŭgan planton laŭ la moto: por ĉiu malsano kreskas herbo. Estas la sovaĝa kardo (*Dipsacus fullonum*). De ĝia tinkturo oni glutas trifoje tage 20 gutojn dum minimume kvin aŭ ses semajnoj. Ĝi helpas tre efike.

Rikecioj

Laŭ la kaŭzanta bakterio la malsanoj estas diversaj. Ĝenerale estas febro kun danĝera aŭ sendanĝera evoluo. Homoj, kiuj regule manĝas ajlon, estas bone protektataj. Vakcinado ne ekzistas.



La sovaĝa kardo helpas je boreliozo. Foto: Pollinator en Vikipedio.

Frusomera meningoence- falito FSME

Ĝin kaŭzas viruso. Ekzistas vakcinado, kiu tamen estas tre danĝera kaj tial ne rekomendinda. Kontraŭ virusoj helpas gliciriza sukero. Ĝi estas la sola substanco konata, kiu kapablas venki virusojn kaŝitajn enĉele. Ĝi troviĝas en la ekstrakto de gliciriza radiko (Radix Glycyrrhizae).

Por ĉiuj malsanoj validas: homo bone nutrata kun bona defendopovo havas malgrandan riskon infektiĝi.

Risko ekzistanta, sed malgranda

Ankaŭ por aliaj la risko ne estas tiel granda, kiel multaj homoj timas. En la tiel nomataj riskoregionoj nur 1 - 5% de la iksodoj estas infektitaj kaj povas transigi la malsano(j)n. Inter la homoj pikitaj de infektitaj iksodoj nur ĉiu mila ekmalsanas.

Prevento

Estas utile vesti sin tiel ke la tuta korpo estas kovrata. Oni evitu herbejojn kaj arbustojn. Post promenado oni kontrolu siajn vestojn. Se oni trovas suĉantan iksodon estas necese tre singarde forigi ĝin. Por tio ekĝistas specialaj iloj, sed ankaŭ simpla pinĉilo povas helpi. Oni atentu, ke oni ne premu la ventron de la iksodo kaj ke ne restas la suĉiloj en la haŭto.

Ŝvitiga drogo

aŭ drogo por elpeli ekzogenacajon kaj forigi ekster-sindromon

D-ro WANG Disheng, Ĉinio

La drogoj, kiuj povas elpeli ekzogenacajon kaj kuraci ekster-sindromon (supraĵ-sindromon), estis difinitaj kiel la ŝvitigaj drogoj. Tiuj drogoj ofte karakteriziĝas per pik-gusto, eksternen-disiĝa efik-direkto kaj al-ĝin-kanaligoj al la pulmoj kaj veziko. Iliaj efikoj prefere loĝiĝas aŭ iras en neprofunda tavolo de homkorpo kaj povas elpeli ekzogenacajon el ĝi aŭ elekskreĉiigi ekzogenacajon kun ŝvitiĝado.

La drogoj kontraŭ ekster-sindromo (supraĵ-sindromon) ĉefe aplikiĝas por kuraci la simptomojn kaŭzitajn de ekzogenata patogenezaĵo, kiel antipation al malvarmo, febron, kap-doloron, korp-doloron, senŝvitecon (aŭ malfacilan ŝvitiĝon) kaj flosantajn pulsojn ktp.

Ekster-sindromo konsistas el la sindromoj de vent-malvarmo kaj vent-varmo kaj ili havas respektivajn karakterizojn, kiuj diferencas unu el la alia. Do la drogoj kontraŭ ekster-sindromo ankaŭ dividiĝis en la du specojn kiuj havas la diferencajn gong-xiao (funkci-efikojn).

Unu el la du specoj estas la pik-varma drogo nur por elpeli vent-malvarmon kaj la alia estas la pik-malvarma nur por elpeli vent-varmon.

Aplikante tiujn drogojn oni devas doni atenton pri la du flankoj.

Unue oni devas bone analizi kaj distingi sindromon kaj tiamaniere ĝuste elekti koncernan specon de la drogoj kunapliki por pli efike kuraci la sindromon. Ekz. por kuraci ekster-sindromon kun internvarmo, oni devas apliki la drogon kontraŭ ekster-sindromo akompanata kun la varm-dispela drogo. Por kuraci ekster-sindromon kun atonio, oni devas kunapliki la tonikuman drogon por plifortigi zeng ci-on (kontraŭpatogenan ci-on) kaj elpeli ekzogenan patogenacajon. Por kuraci ekster-sindromon kun patogena humido, oni devas kunapliki la drogon dispelantan patogenan humidon.

Due aplikante la drogon kontraŭ ekster-sindromo, oni devas zorge elekti ĝian dozon kaj eviti eksceson, speciale por la drogo kun forta efiko. Ĉar se la efiko trointensigas, tio multe konsumos jang-cion kaj enkorpan fluidon. La simptomoj de spontana ŝvitado el supraĵa astenio aŭ nokta ŝvitado el jin-atonio evitas tiun drogon aŭ oni devas atente apliki la drogon al tiuj simptomoj.

[LAŬ FORMALOGIO DE TĈD]

La simptomo de antipatio al malvarmo rezultas el kuntiriĝo de haŭt-angio, reduktata sang-cirkula kvanto, malaltiĝo de haŭt-temperaturo kaj ĝia ekscito al la malvarm-senso.

Kontraŭ la ekster-sindromo kiel antipatio al malvarmo, ternado, febro kaj kapdoloro, la drogoj kiel efedro (*Herba Ephedrae*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*), asaro (*Herba Asari*), skizonepeto (*Herba Schizonepetae*), dahurika angeliko (*Radix Angelicae Dahuricae*) kaj saposnikozio

(*Radix Saposhnikoviae*) kontraŭ ekster-sindromo havas la jenajn efikojn.

1. Ŝvitigo

Ŝvitigo estas unu ĉefa rimedo por elvaporigi varmon el homkorpo kaj teni ĝin en norma temperaturo. Ŝvitiĝa maniero konsistas el la varmeca ŝvitigo kaj psikeca ŝvitigo.

La pik-varma drogo, kiel efedro (*Herba Ephedrae*), kiu entenes e-fedrinon, povas doni al homkorpo varm-senton kaj fari homkorpon en alt-temperatura medio ŝviti multe kaj facile. Varmsento utiliĝas por malstreĉigi la anginan kuntiron en spir-kanala mukozo kaŭzatan de malvarmeca ekscito, aktivigi sang-cirkulon en la parto kaj plifortigi homkorpan rezistecon kontraŭ malsano. Iu drogo, kiel zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*) entenas pik-ingrediencojn kiel zingiberenon (zingiberene) ktp, kiu povas dilati angiojn kaj stimuli sang-cirkulon. Do trinkinte zingibr-supon, oni sentas tutkorpon varma, kio indikas, ke zingibro akcelas ŝvitiĝon tra plibonigo de sang-cirkulo.

2. Senfebrigo kaj malaltigo de temperaturo.

Febro estas la oft-videbla simptomo de ekster-sindromo en kliniko. La plimulto de drogoj por moderigi ekster-sindromon, kiel bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), asaro (*Herba Asari*), notoptergo (*Rhizoma et Radix Notopterygii*), skizonepeto (*Herba Schizonepetae*), saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*), puerario (*Radix Puerariae*) kaj zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*) povas mildigi aŭ senigi febron. Iuj el tiuj povas ankaŭ malaltigi norman temperaturon de eksperimentaj animaloj, kiel volatila oleo el efedro, bulpeŭr-saponino el bulpeŭro kaj puerarino el puerario ktp. Iliaj meĥanismoj kontraŭ febro eble estas ŝvitigi homkorpon kaj disvaporigi varmon, dilati angiojn en la haŭto kaj disigi varmon, inhibicii la komponiĝojn de CAMP aŭ PGE2 kaj redukti febrigajn materialojn, rezisti kontraŭ inflamo kaj redukti inflamigan materialon aŭ rezisti kontraŭ bakterio kaj viruso.

3. Sedativumo kaj sendolorigo.

Kapdoloro kaj korpdoloro estas ankaŭ oft-videlaj simptomoj de ekster-sindromo. Studado trovis, ke la drogo moderigi ekster-sindromon, escepte de efedro (*Herba Ephedrae*), tute havas iugrade la efikon de sedativumo, reduktante memvolan movon de eksperiment-ratoj aŭ plilongigante la dorm-tempon kaŭzatan de fenobarbitalo (*Phenobarbital*), kaj ke la plimulto de tiuj drogoj, kiel bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), cimicifugo (*Rhizoma Cimicifugae*), zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*), asaro (*Herba Asari*), dahurika angeliko (*Radix Angelicae Dahuricae*), saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*), mento, morusfolio (*Folium Mori*) kaj krizantemo (*Flos Chrysanthemi*) havas evidentan inhibician efikon sur la dolorig-modelon de eksperiment-ratoj, kaj la lokoj en kiuj kontraŭdolora efiko funkcias, estas en la centro-nervo por iuj drogoj kaj en periferi-nervo por la aliaj.

4. Kontraŭinflamo kaj kontraŭalergio.

La oft-videlaj simptomoj de ekster-sindromo, kiel tusado kaj kraĉado rezultas el la spir-kanala inflamo. La plimulto de tiuj drogoj kiel bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), cimicifugo (*Rhizoma Cimicifugae*), saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*), dahurika angeliko (*Radix Angelicae Dahuricae*), skizonepeto (*Herba Schizonepetae*) kaj asaro (*Herba Asari*) havas evidentan inhibici-efikon kontraŭ variaj inflamecaj reakcioj.

Haŭt-simptomo, kiel urtikario estas ofte kaŭzita de patogena ventaĉaĵo laŭ TĈM, kiun povas efike kvietigi la drogoj kontraŭ vent-malvarmo aŭ vent-varmo kiel efedro (*Herba Ephedrae*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*), magnolio (*Flos magnoliae*), bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), cikadŝelo (*Periostacum Cicadae*) kaj mento. Utiklaro, laŭ moderna medicino, havas la rilaton al alergio. La drogo kontraŭ ekster-sindromo povas kvietigi utiklarion, tio indikas ke la drogo povas inhibicii ĉiun tipon de alergio. Meĥanismo de la inhibiciado estas kompleksa: deteni alergi-

igaĵon de homkorpo; reteni mastociton (mastocyte) rompiĝi; reteni alergiigaĵon afekcii organismon; rezisti al produktiĝo de antikorpo.

5. Reguligo de imuna funkcio

Eksperimentoj indikis, ke bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), puerario (*Radix Puerariae*) kaj saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*) povas plifortigi englutadon de la makrofago (macrophage) kaj plialtigi homkorpan rezistecon kontraŭ malsano. Studado trovis, ke multaj tradiciaj receptoj povas stimuli antikorpan produktiĝon kontraŭ endotoksino, akcelante elpurigon de endotoksino, kio estas unu el la grava meĥanismo de “dispeli ekster-sindromon ĝis endogena patopenaĉaĵo.”

Laŭ TĈM, bakterio, viruso kaj nenormala temperaturo estis rigardataj kiel ekzogena patopenaĉaĵo. Multaj ekster-korpaj eksperimentoj indikis, ke la multaj pik-varmaj drogoj por moderigi ekster-sindromon, kiel efedro (*Herba Ephedrae*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), skizonepeto (*Herba Schizonepetae*), saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*), asaro (*Herba Asari*), zingibro (*Rhizoma Zingiberis Recens*), magnolio (*Flos Magnoliae*), askolonblanko kaj la pik-malvarmetaj drogoj por moderigi ekster-sindromon, kiel bupleŭro (*Radix Bupleŭri*), mento, krizantemo (*Flos Chrysanthemi*), morusfolio (*Folium Mori*) kaj arkto (*Fructus Arctii*) povas, inhibicii la multajn bakteri-ojn, kiel ovflavastafilokokojn, kojlobacilojn, tifbacilojn pneŭmokokojn, hemolizajn streptokokojn kaj iujn fungojn kaŭzantajn dermatozon. Ankoraŭ efedro (*Herba Ephedrae*), cinamomo (*Ramulus Cinnamomi*), perilo (*Folium et Caulis Perillae*), saposnikozio (*Radix Saposhnikoviae*), moslo (*Herba Moslae*), magnolio (*Flos Magnoliae*) kaj mento ktp. povas inhibicii virusojn en la spirkanalo.

La drogoj por dispeli vent-malvarmon.

Tiu speco de drogoj havas pik-guston kaj varm-naturon. La pik-gusto povas disemanigi ion kaj la varm-naturo povas dispeli malvarmon. Tiu speco de la drogoj ofte aplikiĝas por kuraci vent-malvar-

mecan ekster-sindromon, kiel antipation al malvarmo, febron, senŝvitecon, kapdoloron, korp doloron, maldikan kaj palan lang-tegaĵon, flosantan pulson. Iuj drogoj el tiu speco povas ankaŭ kvietigi astmon, moderigi edemon, dispeli patogenan humidon kaj mildigi doloron ktp..

92a UK

Vizito al Rehabilitada Centro de Jokohamo

08-07, marde posttagmeze, sub la gvido de UEDA Satosi (KN 398) 10 medicinistoj vizitis la urban institucion, Rehabilitadan Centron de Jokohomo.



D-ro Itoo, la prezidanto de la centro prezentis la institucion per filmo. La ĉef-terapeŭto, s-ro Miyazi kondukis nin al vasta gimnastikejo, kie ludas handikapitoj tablotenison kaj similaj. En apuda ĉambro estas instalitaj diversaj trejnmaŝinoj. Li emfazis: trejnekzercado nun estas enuiga kaj peniga laboro, sed per alternado de trejnado kaj ludoj, ili sentas sin progresanta en la rehabilitado.

La ĉefa teknikisto, s-ro Iijima montris al ni la laboratorion. Teknikistoj esploras komputil-simuladan programon por reformi loĝdomon de handikapitoj, aŭ ekipaĵon reguligi medion de tetraplegiulo per sia spiroblovo.

Raportis Hideki HARADA (KN 219) en Ondas Jokohamo

INA estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio

Eldonejo: MZ-Verlag Ltd.
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel,
Germanio. Rete: info@mz-verlag.de
www.mz-verlag.de

Ĉefredaktoro: Harald Schicke

Adreso de INA:

Harald Schicke
Schoolbrink 12, 27383 Scheessel
Germanio
Tel: +49 4263 94087
Fax: +49 4263 94088
schicke@mz-verlag.de

Adreso por korespondado:

Rosa Ebel, Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio

Retadreso:

ina-asocio@web.de
www.esp-ina.com



El la laboro de INA

Dum Esperanto-renkontiĝo en Bahratal (Germanio, proksime al la limo al Ĉeĥio, 8a - 11a de junio) INA-prezidanto Harald SCHICKE prelegis pri biero kaj sano. Oni dume gustumis diversajn specojn de biero. Dua prelego temis pri la efikoj de korea ginsengo (Panax ginseng C. A. Meyer) al la homa sano.

INA-membrino SONG Jeong-ok prezentis korean muzikon per la tradicia korea tamburo Ĝang-gu.

Partoprenis proksimume 30 personoj el kelkaj landoj.

Bierumantoj atente auskultas dum la prelego pri biero kaj sano.